

## Instruista Trejnado

ILEI praktike subtenas tiun trejnadon, ofertinta kune kun UEA jam de du jaroj stipendiojn por la instruisto-trejnaj kursoj de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. ILEI kunlaboras kun <edukado.net> por starigi perretan trejn-kursojn por tiuj ne kapablaj atingi fizikajn kursojn. Ĝi okazigas proprajn kursojn kaj subtenas tiujn organizitajn de ĝiaj landaj sekcioj. Ĝi prizorgas ekzamenojn nome de UEA/ILEI kaj subtenas tiujn laŭ la eŭropa referenckadro.

## Tutmondigo

Pli kaj pli, tiu trejnado kaj alia agado de la ligo etendiĝas tra la mondo, ekzemple kun kursoj kadre de la ILEI-konferenco en Benino (2008), krome en la Demokrata Respubliko Kongo (2009), Burundo (2010), kaj en Ĉinio en 2009 kaj 2010.



Plia trejnkurso okazis en la ĵusa konferenco en Kubo (2010). ILEI aktivis en la Azia Kongreso (Mongolio, 2010) kaj planas tion fari en la sekva Tut-Amerika Kongreso en Sao Paŭlo, Brazilo (TAKE, 2011).

## Projekto 125

ILEI lanĉis ambician projekton, por inde celebri la ĉefan jubileon de la sekvaj kvin jaroj – la 125-jaran jubileon de la apero de la Unua Libro, kiu okazos en la 26<sup>a</sup> de julio, 2012. La plano estas oferti serion da 125-tagaj aŭ 125-temaj kursoj, ĉu surlokaj, ĉu retaj, en la periodo marto-julio, 2012. Fari tion plurlande kaj retligi la lernantojn donos eblojn altiri la atenton de ĵurnalistoj. ILEI jam prezentis komencajn planojn kaj liveroskemon kaj fine de 2010 serĉas partnerojn.

## Profesiigo

Multaj interpretas la necesan 'profesiigon de la laboro', tiel, ke amatoroj laboru pli profesinivele. Tio al ILEI ne sufiĉas – tro grandas la defioj. Unuafoje por 2011, la ligo aldonas signifan sumon al sia buĝeto por honorarii helpanton kaj disponi pri modesta oficejeto. Komprenante, ke la plimulto de nia agado plue dependos je bonvoluloj, tiom pli efikaj estos iliaj streboj pro la aldono de honorariataj laborfortoj. Iomgrada vera profesiigo estas la sola ebla vojo antaŭen.

## Konferenco kaj Simpozio 2011

Eŭropaj konferencoj de ILEI ekestas raraĵoj, sed 2011 donas la okazon – la 45<sup>a</sup> konferenco okazos en Kopenhago de la 17<sup>a</sup> ĝis la 23<sup>a</sup> de julio. Jen bonetosa semajno kun alta faka nivelo. Tion ĉi-foje garantios dutaga simpozio kadre de la konferenco, kun la temo *Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado*. La simpozion organizas la Universitato de Kopenhago, ILEI kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

## Mendilo

ILEI estas ligo por instruistoj de ajna temo por ajna aĝnivelo. ILEI estas la ligo por ĉiu, kiu okupiĝas pri edukado, aŭ kiu konsentas pri la ŝlosila graveco de bonkvalita kaj moderneca instruado de Esperanto. Subtenu la ligon kun igo!

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Retadreso: \_\_\_\_\_

Lando: \_\_\_\_\_

Ino /  Malino. Profesia instruisto: JES / NE

### Membreco en ILEI

Papera 2011  Reta 2011: \_\_\_\_\_

Papera 2012  Reta 2012: \_\_\_\_\_

### Abono al Juna amiko

\_\_\_\_\_ ekz. por 2011 \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_ ekz. por 2012 \_\_\_\_\_

### Donacoj

Por la Koleghelpa Kaso: \_\_\_\_\_

Por la Kaso Dazzini (konferencanoj): \_\_\_\_\_

Por la Kaso Szerdahelyi (projektoj): \_\_\_\_\_

Por la Afrika Kaso: \_\_\_\_\_

Por la Kaso Interkulturo: \_\_\_\_\_

SUME: € \_\_\_\_\_

Vidu dorse pri pagmanieroj.

	A-landoj	B-landoj
Membreco kun papera IPR	€ 18	€ 9
Membreco kun reta IPR	€ 8	€ 4
Unu abono al <i>Juna amiko</i>	€ 14	€ 9
Ekde 3 abonoj, po	€ 11	€ 7

